

V-19119/21

OOMOTO

ORGANO DE OOMOTO
KAJ U. H. A.

21-a Jaro N-ro 229-230: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo. **Julio-Aŭg. 1959**

Abonprezo: ₡ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Rionwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Por la Mondanigo de Japanujo

juris plulabori la Japanaj Mondfederalistoj

ĉe la 6-a Kongreso en Kanazaŭa

Kun la plej proksime-atingota kaj la nepre-atingota celo: mondanigi Japanujon por “unu mondo eterne paca”, la 6-a Kongreso de la Rezentantoj de la Japanaj Mondanigitaj Komunumoj por Mondfederacio okazis du tagojn, 13-14 junio, en Kanazaŭa, Iŝikaŭa Prefektujo, — kie la Movado fariĝis plej vigla en nia lando. En la aŭditorio de la Domo de *Hokkoku Sinbun* (loka granda ĵurnalo) de tiu urbo kongresis ĉ. 500 reprezentantoj de ĉiuj japanaj mondanigitaj komunumoj (8 prefektujoj kaj 171 urboj) kaj kelkaj dekoj da delegitoj senditaj de la organizaĵoj, kiuj subtenas la Mondfederalismon.

Ĉiu ĝisnuna Kongreso estis kunveno por interkonsiliĝo de la japanaj mondanigitaj urboj: ĝin partoprenis nur la oficialaj reprezentantoj de la koncernaj magistratoj kaj la aliaj partoprenintoj estis akceptitaj kiel “observantoj”. Sed la nuna Kongreso por la unua fojo akceptis ankaŭ ĉi lastajn kiel „reprezentantojn”, tiel ke ĝi fariĝis en la plena senco la *Japana Tutlanda Kongreso* por la Mondfederacia Movado. Sed ni faru rimarkon, ke eĉ se ne enkalkuli la kelkdek reprezentantojn de la koncernaj grupoj, la nombro ekskluzive de la reprezentantoj de la mondanigitaj komunumoj per si mem triobliĝis kompare kun la nombro en la antaŭa Kongreso. Tio montras la grandegan progreson de la Movado en Japanujo.

Ni ne faros ĉi tie la kutiman kongresan raporton pri la tagordo, proceduro ktp., sed ni devas prezenti la Kvar Proponojn, kiujn oni faris dum la kongreso kaj, post entuziasma diskutado, unuanime aprobis por la efektivigo, kaj kiujn oni fine formulis en la formoj de Kongresaj Daklaro kaj Rezolucio. La Kvar Proponoj estis jenaj:

1) Pri la rapida mondanigo de ĉiuj japanaj komunumoj:

- a) Ni preterlasu neniun okazon de tutlanda konferenco de la guberniestroj aŭ la urbestroj kaj de la regulaj kunsidoj de la guberniaj aŭ urbaj deputitaroj k. s., por utiligi ĝin, ke la movado por la mondanigo de ĉiuj prefektaj, urbaj kaj vilaĝaj komunumoj estu akcelata tra la lando. (Proponita de la urbo Himeĵi)
- b) Ni starigu ĉe ĉiu stacidomo en la mondanigitaj urboj kaj en la centra parto de tiuj urboj la mondfederacian monumenton aŭ signokolonon, por ke la urbaj loĝantoj, turistoj, pasaĝeroj ktp. estu klerigataj pri la ideo de Mondfederalismo. (Proponita de la urbo Tottori)
- 2) Pri la akcelado de la Mondanigo de Japanujo :
- a) Ni proponu al ĉiuj lokaj komunumaj organizaĵoj, kiel de la guberniaj aŭ urbaj deputitaroj k. s. ke en siaj venontaj kunsidoj ili faru "rezolucion" por premi, ke la japanaj registaro kaj parlamento deklaru kiom eble plej frue la Mondanigon de Japanujo. (Proponita de la urbo Macue)
- b) Ni, en la nomo de la nuna Kongreso, komuniku nian deziron rekte al la prezidantoj de ambaŭ ĉambroj de la parlamento, same kiel al la parlamentanoj kaj la registaro, ke Japanujo kiel eble plej frue deklaru sin mondanigita ŝtato. (Proponita de Iŝikaŭa-prefektujo)
- 3) Pri la "Subskribo-kolekta" Kampanjo por akceli la Mondanigon de Japanujo :
- a) Por tio, ni nin direktu ĉefe al la laboristaj sindikatoj, instruistaj grupoj, junularaj kaj virinaj asocioj kaj aliaj organizaĵoj en ĉiuj mondanigitaj komunumoj. (Proponita de la urbo Kuraŝiki)
- 4) Pri la popolklerigado pri la ideo de Mondfederalismo :
- a) Por la ĝenerala klerigado de la popolamasoj, ni klopodu en la klerigado, antaŭ ĉiuj, de la ĉefaj kaj eminentaj gvidantoj en la kampoj de socia edukado. (Proponita de la urbo Kanazaŭa)

Deklaro

Kun la arda deziro rapide realigi la Mondfederacion, ni, la reprezentantoj de 8 mondanigitaj prefektujoj kaj 171 mondanigitaj urboj, kaj la delegitoj de diversaj organizaĵoj subtenantaj la Mondfederalismon, kolektiĝis ĉe Kanazaŭa por la 6-a Japana Kongreso de la Reprezentantoj de la Mondanigitaj Komunumoj por Mondfederacio.

La intensa streĉiteco de la nuntempa mondsituacio, bazita sur antagonismo inter la du grandpotencaj tendaroj, sin montras ankoraŭ neniom mildigita. Dume la progreso de la scienco kaj tekniko sukcesis ellabori ne nur artefaritajn satelitojn kaj interkontinentajn balistikajn misilojn, sed ankaŭ la ĉiam pli drastajn tipojn de A- kaj H-bomboj, kaj pro tio la vivo de la homaro estas sub konstanta minaco de militeksplodo.



La 6-a Kongreso de la Reprezentantoj de la Japanaj Mondanigitaj Komunumoj en la Domo de *Hokoku Sinbun*, Kanazaŭa

Hodiaŭ, kiam la mondo laŭdire estas "malvastigita" kaj jam eniris ĉe la "kosman epokon", la plej granda sensecaĵo estas, ke ŝtatoj kaj nacioj sur la tero kontraŭstaras unu la alian por ekstermi sin reciproke.

Konstatinte tion el la plej realisma vidpunkto, ni rekonfirmas la konvinkon, ke la Mondfederacio devas esti efektivigita ĉe unu tagon pli frue.

Rezolucio

1. Ni klopodos efektiviĝi la Mondanigon de Japanujo por Mondfederacio;
2. Ni konstante alvokos al la japanaj registaro kaj parlamento premante, ke ili decidiĝu efektiviĝi la Mondanigon de Japanujo kaj fari la Deklaron pri tio al la tuta mondo;
3. Ni lanĉos tutlandan subskrib-kolektan kampanjon, por ke ni per la forto de la popolamaso povu influi la japanajn registaron kaj parlamenton por la Mondanigo de Japanujo;
4. Ni nin dediĉos por la popolklerigado pri la ideo de Mondfederalismo;
5. Ni laboros por pli-intima interrilatiĝo kaj kunlaborado kun la mondanigitaj komunumoj en diversaj landoj de la mondo;
6. Ni ĉiam pli energie instigos al la Uno kaj al la registaroj de la grandaj potencoj, ke ili serioze prikonsideru la realigon de Mondfederacio per la reorganizado de la Uno je Mondregistaro.

Kanazaŭa, la 13-an de Junio, 1959

La 6-a Kongreso de la Repezentantoj de la Japanaj
Mondanigitaj Komunumoj por Mondfederacio

NOTO: Oni decidis, ke la venontjara Kongreso okazos dufoje: printempe en Amagasaki kaj aŭtune en Takamacu.

Japanaj Virinoj kunagadas

Paralele kun la 6-a Kongreso, supre raportita, la 3-a Konferenco de la Repezentantoj de Japanaj Virinaj Asocioj por Mondfederacio okazis ĉe la Domo *Soohuukaku*, la distrikta centro de Oomoto, en Kanazaŭa. Partoprenis 110 oficialaj reprezentantoj de 18 virinaj asocioj kaj 150 observantoj. Oni akceptis kaj publikigis la aliĝon de 6 novaj membroj-asocioj el Morioka, San'joo (Okajama), Jamagata, Jokohama, Hakodate kaj Kamakura, kaj unu kristanan grupon el Tokio. En la Laborkunsido oni decidis: 1) alvoki por aliĝo de nemembroj-asocioj por pli fortigi la tutlandan organizon de la virina movado por Mondfederacio; 2) kunlabori en la Subskribkolekta Kampanjo por la Mondanigo de Japanujo; 3) kunlabori en la movado por la mondanigo de ĉiuj japanaj komunumoj; 4) ekspedi komunikaĵojn kaj leterojn al amikoj kaj amikaj grupoj en la eksterlando fare de la individuaj membroj de la Virinaj Asocioj por Mondfederacio. Parto de la Deklaro proklamita de la Konferenco tekstas jene:

“Jam evidentiĝis, ke al la Uno mankas la kompetenteco por ĉesigi la produktadon kaj eksperimentadon de nukleaj armiloj. En tiu ĉi grava momento, ni devas ĉiam pli klopodi por la efektivigo de Mondfederacio, kiu sole estas la rekta vojo kondukanta al la eterna paco de la mondo”.



La 3-a Konferenco de la Repezentantoj de Japanaj Virinaj Asocioj por Mondfederacio, Kanazaŭa

Jasuo Sakurai

Dek Gvidprincipoj de la Oomoto-Movado (2)

Rilato de Dio kun homo

2. Dio kaj la homo ekzistas unu por la alia. Kie okazas la unuiĝo de Dio kaj la homo, tie ekestiĝas senlima spirita potenco.

La doktrino de Oomoto instruas: Dio estas Spirito animanta ĉion en la Universo, kaj la homo estas administranto de la ĉielo kaj tero. Kie okazas la unuiĝo de Dio kaj la homo, tie ekestiĝas senlima potenco spirita. Jen la teksto de la fundamenta doktrino de Oomoto klariganta la rilaton de Dio kun la homo.

Dio, kiun oni kredas en Oomoto, ne havas la atributon de ĉiopova en tia senco kiel kelkaj religiistoj iam predikis. Sub la koncepto pri Dio “ĉiopova” en la vulgara senco, homoj emas pensi, kial do Dio, kapabla je ĉio ajn, ne povas plenumi por ili tiun aŭ ĉi tiun aferon. Sed, sen la interveno de la homo tute ne estas konsiderebla la ĉiopoveco de Dio. Tamen, Dio ja estas ĉioscia kaj ĉiopova en la senco ke Li kreis la homojn sur la terglobo por servi ilin en la konstruado de la mondo. La plena potenco de ĉiopovo do ekestiĝas per la unuiĝo de Dio kaj la homo.

La rilato de Dio kun homo unuvorte estas kvazaŭ tiu de sonorilo kun sonfrapilo: Kiam oni batas la sonorilon per sonfrapilo, estiĝas sono.

La sono estiĝas nek de sonorilo sola, nek de sonfrapilo sola, sed estiĝas ĉe la kunfrapiĝo de ambaŭ instrumentoj. Tiu ĉi sono respondas al la “spirita potenco”, en la supre-citata doktrino.

Onisabro sur Monto Takakuma

Kiam Onisabro estis 28-jara (t.e. en la jaro 1898), li faris unusemajnan asketismon laŭ gvido de anĝelo sur la monto Takakuma proksima de Anao, lia naskiĝloko. Dum tiu asketismo li atingis la klarvidon de certaj kosmaj leĝoj fizika kaj spirita. Sed la unua kompreno estis pri tio: Homo estas vivanta dio. Dum lia senmova meditado sur la roko — vintran nokton en plena mallumo — aperis antaŭ li urso blekanta. Li sentis teruron, ĉar de la knabeco li ofte aŭdis rakonton de maljunaj vilaĝanoj pri granda urso, kiu apenaŭ vidinte homon, sin ĵetas sur lin, disŝiras lian karnon kaj pendigas la restaĵon de la kadavro sur arbo-branĉo. Al Onisabro ne restis espero saviĝi for de tia terura besto. Li rezignacie submetis sin al Dia volo. En tiu momento jen okazis, ke lia timo tute malaperis. La apudesto de la urso donis al li la intiman senton esti kun vivkunulo; ĝia bleko jam sonis ne terure, sed tiel intime kiel dombeste. La urso foriris. Fulmis en lia kapo la kompreno, ke ĉiu

vivantaĵo estas animita, same kiel homo, per la Spirito de Dio — la Dio de Amo.

La tiaman spertaĵon li poste priskribis en la 1-a volumo de la “Rakontoj el la Spirita Mondo” kiel jene:

“Eĉ tia sovaĝbesto fariĝas amiko por homo en la tempo de lia granda soleco! Do, kial ne la homo! Ho, kiom mi estis maldanka en mia vivo, ke mi foje malamis, foje ofendis kaj foje afliktis aliajn! Eĉ tiuj, kiujn oni rigardas kiel malamikojn aŭ malbonulojn, estas same animitaj per la Spirito de Dio. Homoj estas dioj;

ne nur homoj, sed bestoj kaj plantoj kaj ĉiuj aliaj kreitaĵoj estas la fragmentoj de Dio, kiuj donas al nia vivo necesajn forton kaj subtenon.

“En la Dia Regno la plej granda apogo estas kompreneble Dio, tamen en la fizika mondo la homo estas dio, kiu estas la plej granda apogo. Laŭ tiu kompreno mi estis forte konvinkita, ke la homo estas sankta kaj trakti lin malestime signifas blasfemi Dion”.

Laŭ ŝintoisma ideo, “dio en la fizika mondo estas homo”. Tio signifas la unuecon de Dieco kaj homeco. Ĝi estas la koncepto tre

Japanaj Vizaĝoj

(18) *Komokuten*-bodisatvo*

De la Virpakso
la brovoj kuntiritaj —
ĉizitaj restas
en la okul’ dum iras
mi sur la kamp’ aŭtuna.

La supra estas fama tankao de s-ro J. Aizu, japana literatura kritikisto. Virpakso estas la sanskrita nomo de *Komokuten*-bodisatvo, kies bildo estas ĉi tie prezentita. Lia penetrema akra ĉi tie impresiĝas neforgeseble al ni ĉiuj, ne nur al s-ro Aizu. Kio kuŝas en la direkto for de la akraj okuloj? La rigardo estas ne malpli akra ol tiu de “Davido”, skulptita de *Michelangelo*, fikse rigardanta la monstron Goliato. *Komokuten* estas unu el *Ŝiten’no* aŭ Kvar Garduloj de Budaismo, kun severa mieno indigna kontraŭ ĉia maljusteco kaj preta ĝin subpremi. Kiel bela estas la ritma dinamiko prezentita en la reliefaĵoj linioj de la vizaĝa karnomaso! Unu el la plej karakterizaj



formaj artoj de Tempjo-periodo!

Teruo Ueno, prof. de
Kioto Univ. Trad. N. E.

* Farbita argilaĵo konservata en Kai-dan-in de Toodaiĵi Templo, Nara.

malnova, sed samtempe plej nova kaj ĝusta. En Eŭropo de la mezepoko regis, por tiel diri, Diismo, laŭ kiu oni vidis en homoj la sklavojn de Dio. Post la Renesanco, tamen, la homoj rekonis sin laŭ homisma (humanisma) vidpunkto. Dank’ al tio la sciencoj faris grandan progreson. Dank’ al tio tamen la homoj ne nur forgesis Dion, sed forneas eĉ Lian ekziston. Dialektike parolante, la naskiĝo de homismo estis tute natura kiel la antitezo de Diismo (la tezo). Kio do estas la sintezo?

Ĝin prezentas la doktrino de Oomoto. La 2-a gvidprincipo de la Oomoto-Movado diras: *Dio kaj la homo ekzistas unu por la alia. Kie okazas la unuiĝo de Dio kaj la homo, tie ekestiĝas senlima spirita potenco.*

Tion ni legas en Skribo: *Dio kaj la popolo ekzistas unu por la alia. Kiam la popolo komprenos ĉi tiun interrilaton, la mondo fariĝos bona (aprilo, 1899)”.*

Unueco de Dio kaj la homo

O. Deguĉi instruis: “Amu Dion kaj same kiel vi amas Dion, tiel amu la homojn kaj ankaŭ vin mem”.

Ĉi tie ankaŭ estas klare esprimita la “ideo pri la unueco de Dio kaj la homo”.

Kiel ajn multe iu kultas al Dio kaj preĝas al Li, se li malestimas, ofendas aŭ malamamas homojn, kiuj estas la filoj de Dio kaj la “dioj” en la fizika mondo, li ne amas Dion en la vera senco de la vorto.

Same, kiel ajn la homo deziras la

pacon de la mondo, tiel longe kiel li ne praktikas la pacon en sia ĉiutaga vivo, li ne estas la pacamanto en la vera senco.

La rilato inter Dio kaj la homo estas kiel tiu inter sonorilo kaj sonfrapilo. Ju pli granda estas la kunfrapiĝo, des pli granda estas la resonado. Tiel same estas ankaŭ la unuiĝo de Dio kaj la homo, kiu estigas spiritan potencon.

Kiu realigos mondpacon?

La homaro de la mondo sopiras la pacon. Sed kiu realigos la mondpacon kaj kiam?

La respondo: ni — homoj. Sed la paco neniam efektiviĝos, dum la homaro neadas Dion. Ĝi rekonu antaŭ ĉio la ekziston de Dio. Ni preĝu al Dio. Ni estu konvinkitaj, ke al ĉiu justa preĝo nepre respondas Dio. Ni forte batu la sonorilon per granda sonfrapilo kaj ekestiĝos granda resonado tra la mondo.

Trad. *Pezmezo*

LA PRAKTIKO

La Gazeto de la Mondpopolo

Abonprezo por unu jaro: 24 Steloj

Japapaj ges-anoj sendu ¥ 580
al la Redakcio de OOMOTO

Eldonejo:

UNIVERSALA LIGO

Riouwstraat 172, Den Haag,
Nederlando

Tragika Pulkanto

De patrino post nuklea-armila milito...

*Baj, baj, etulino,
ne sonĝu pri flamoj,
ho mia tre kara,
kun tri etaj mamoj.*

*Baj, baj, filineto,
kaj fermu okulojn;
la kripla frateto
forĉasos la kulojn.*

*Baj, baj, knabineto,
ne volu petoli,
la pli aĝa frato
ne povas paroli.*

*Se mi patrinece
nur parte fiaskas,
mi estas felica,
ĉar multaj ne naskas.*

*Mi naskis tri bebojn,
mi povus eĉ pli...
trimaman kaj kriplan
kaj mutan, jen tri...*

*Estonta patrino,
mi kantas al nuno:
ho vidu la eblojn
de sekvo kaj puno...*

*Kun miaj tri beboj,
kolere mi staru,
kaj krii la Nuno,
"Ne faru, ne faru!"*

Postsuferado de Atombombaj Viktimoj

La postvivantaj viktimoj de la atombomboj ĉe Hiroŝima kaj Nagasaki alfrontas teruran estontecon kun la ebleco, ke ankoraŭ nekonitaj kaj pli malicaj tipoj de malsanoj atakos ilin kiel la "sekundaraj postefikoj de radioaktivo". Jen kion avertis 70 japanaj sciencistoj ĉe la du-taga simpozio pri la radioaktivaj postefikoj, kiu okazis antaŭ nelonge en Hiroŝima.

D-ro Masanori Nakaizumi, emerita profesoro de Tokia Universitato, opinias, ke la novaj radioaktivaj malsanoj, kiuj aperos ĉe la postvivantoj de la atombomba katastrofo, estos tumoroj pli malicaj ol la ĝis nun konitaj. Li diris ankaŭ, ke tre komplika kancero, leŭkemio kaj tia perturbo, kiu akcelos la mensan kaj korpan aĝon de homo, estos inter tiuj malsanoj.

Je 31 de marto 1959 troviĝis 213,869 atombombaj postvivantoj en Japanujo: 124,160 en Hiroŝima, 82,293 en Nagasaki kaj 17,416 en aliaj partoj de la lando.

Hodiaŭ, 14 jarojn post la tragikaj atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki, multaj el ili ankoraŭ suferas de diversaj malsanoj radioaktivaj. En siaj 40 raportoj, la 70 ekspertoj kaj kuracistoj raportis, ke la nombro de kancer-pacientoj laŭ terura proporcio kreskis inter la "frapitoj" de radiumado; ke la malsanoj ligitaj kun la cerbo, koro, spirorgano kaj sangcirkulado ankoraŭ multe turmentas la postvivantojn kiel la sekundaraj postefikoj.

La sciencistoj diris, ke ĉiuj radiumaj "frapitoj" havas unu komunan abnormal-econ. Ili plendas pro ekstrema langvoro kaj diras: "Ni facile laciĝas kaj estas facile kaptitaj de malsanoj de diversaj tipoj". Ili estas nervozaj ĉar ili estas etiketitaj kiel la "frapitoj"; sekve, ili vivas tre maltrankvilan vivon timante fatalan atommalsanon, kiu atakos ilin. La sciencistoj asertis, ke ankaŭ tiu ĉi supersentemo kondukas al variaj malsanoj.

D-ro Gensaku Oho de la Hiroŝima-Asocio de Kuracistoj raportis, ke la atombombo en Hiroŝima plimultigis la kazojn de kancero. Li diris, ke el ĉiuj 18,737 mortintoj en Hiroŝima dum la periodo 1951-1958, 1,430 estis la viktimoj de kancero. Alivorte, la kancer-viktimoj en Hiroŝima dum tiu periodo estis 109.2 viroj kaj 89.6 virinoj por ĉiu centmilo. Tio signifas, ke la cifero en Hiroŝima superas ol la tutjapana mezuma mortokvanto je kancero, kiu en la sama periodo estis: 90.9 viroj kaj 77.2 virinoj por ĉiu centmilo.

D-ro Oho diris ankaŭ, ke la nombro de kancer-kazoj estas en rekta proporcio kun la kvanto de radiumado, kiu frapis homojn. Kancerroj de la pulmo, utero, ovario kaj stomako estas plej oftaj.

Ralph Hodgson

Portebla Radio

*"Edziniĝi? — kun la scio pri fatalo:"
knabinoj diros, "ne mi!",
morgaŭ en krepuska kampo de sekalo
irante por promeni.*

Trad. Dan Rak

Turnopunkto: Vojo al Mondfederacio

El la Kunsido de Ĵurnalisto kun la Sep-persona
Apelacia Grupo por Paco

Enkonduko

Ni jam raportis plurfoje pri la "Sep-persona Apelacia Grupo por Paco" kaj la deklaro, kiun ĝi publikigis kun porpacaj urĝaj rekomendoj al la japanaj registaro kaj parlamento kaj kiu ne nur akiris la personan subtenon de la ĉefministro s-ro Kiŝi, sed ankaŭ kaŭzis sensacion en la japana amaskomunikado, aparte en la formo de frontartikola polemiko de la du plej gravaj ĵurnaloj en nia lando, la *Asahi* kaj la *Mainichi*.

Ĉisube ni prezentas la parolojn el la kunsido, kiu lastatempe okazis inter s-ro Ŝintaro Rjuu, fame konata ĵurnalisto kaj redakcia komitatano de la *Asahi* kaj la membroj de la Sep-persona Apelacia Grupo por Paco.

La sep membroj de la Grupo estas:

S-ro *Tamon Maeda*, prez. de Japana Unesko-komisiono kaj estinta ministro de edukado;

Prof. *Seiji Kaja*, prez. de Tokia Universitato;

Prof. *Hideki Jukaŭa*, direktoro de Kiota Esplorejo pri Baza Fiziko kaj nobel-premiito;

S-ro *Jasabro Ŝimonaka*, ĉefdirektoro de Japana Unuiĝo por Mondfederacia Registaro;

S-ino *Tano Joodai*, prez. de Japana Virina Universitato;

S-ino *Tanaki Uemura*, prez. de Japana YWCA;

S-ino *Raiĉoo Hiracuka*, honora prez. de Japana Federacio de Virinaj Organizaĵoj.

Krome, s-ro *Ikki Hidaka* agas kiel sekretario de la Grupo.

S-ro Rjuu: Mi volas esti informita pli multe pri la celoj de la Deklaro pri Nova Mondordo. Ni komencu do per demando, kia statas la nuntempa mondkrizo.

S-ino Joodai: Nuntempe, la atomarmilojn posedas nur tri grandaj potencoj. Sed se la afero iras senbride, baldaŭ Francujo kompreneble, kaj Germanujo, Svisujo, Kanado kaj ankaŭ aliaj nacioj ekhavas ilin. Tiam la danĝero de atomeksplodoj estos multe pli kreskinta ol ĝis nun.

Prof. Jukaŭa: Baldaŭ ni estos en tia pozicio, el kiu retirigo ne plu estos ebla — kun la nacioj marŝantaj en plej teruran direkton.

S-ro Rjuu: Se la atombomb-ekspoloda eksperimentado estos malpermesita, tiam la evoluigo kaj disportado de atomarmiloj povos esti

iugrade bremsita. Sed tio per si mem ne garantias la ĉesigon de la produktado kaj uzado de tiaj armiloj. La armadkonkuro jam estas ligita kun la evoluigo de longdistancaj misiloj por forpafi atomŝargitajn roketkapojn. La tre granda rapideco de scienca progreso ne metas la limojn al tia konkuro. Sekvante la iniciaton de Usono kaj Sovetio, Britujo nun rapidas pretigi sian projekton pri interkontinentaj balistikaj misiloj (IKBM). Eĉ se la brita projekto sukcesos dum la venontaj kelkaj jaroj, estas fakto, ke la misiloj estos elmodiĝintaj antaŭ ol ili estos pretaj por uzo. Ankaŭ la interkontinentaj misiloj, kiujn Usono kaj Sovetio nun prilaboras, fariĝos eksmodaj pli rapide ol ili estos elfaritaj, — ĉar ili estas de la speco muntita sur likv-motoraj roketoj. La konkuro per tiaj armiloj certe kondukos al infero — al la ekonomia mempereco de ĉiu nacio, kiu eniras la vetkuron.

Prof. Kaja: Aliflanke tamen, la porpaca utiligo de atomenergio progresas preskaŭ sen sekretaj kaŝoj kaj en tiu kampo la internacia kunlaboro estas videbla. Atomenergio ĉie estas industriigata. Sed tamen, se milito eksplodos, ĉiu nacio havanta industriajn potencon povos fabriki atomarmilojn, kvankam por tio ĝi bezonos sufiĉan tempon. Same, ankaŭ pri hidrogenbomboj. Ĉar eĉ se atomarmiloj estus likviditaj, la scio kaj tekniko por fabriki ilin postvivos, kaj se neceso, la preparoj por transuzi la materialon por milita tempo estos komencitaj senprokraste. Baldaŭ ĉiu nacio faros la samon kaj denove ekhavas la atomarmilojn pretaj. Tio signifas, ke la danĝero por ĉiam restos tiel longe, ĝis la mondo estos ŝanĝita en lokon, kie la nacioj ne plu sentos ia bezonon apogi sin sur tiaj armiloj kaj kie la neceseco por evoluigi ilin ne jam estos sentata.

S-ro Rjuu: Vi ĵus parolis pri transuzo de la materialo por milita tempo. La samon ni povas diri ankaŭ pri la ter-satelitoj. Devus esti tre simpla afero redukti ilian rapidecon kaj per ili traf-pafi celojn, eĉ se IKBM, kiel tiaj, estus malpermesitaj.

Prof. Kaja: Ŝajnas, ke Usono elfaris supersenteman radar-sistemon. Kiam Sovetio lanĉis IKBM-on, Usono tuj konfirmis la verecon de tiurilata anonco. Oni povas ekscii la lanĉon de misiloj eble en malpli ol dek minutoj. Cetere, ĉar ili bezonas ĉ. tridek minutojn por atingi sian celon, oni nun prikonsideras kontraŭrimedon por barpafi ilin mezvoje; t.e. la stokadon de kontraŭmisilaj misiloj komutitaj kun la radar-netaro en la Arkto. En Usono oni parolas pri la likvido de atomarmiloj unuflanke, kaj pri la evoluigo de kontraŭmisilaj misiloj por defendo aliflanke. Sed imagu, ke oni sukcesis mezvoje barpafi naŭdek naŭ el ĉiuj cent misiloj, kio okazus se la centa unusola misilo trafus la teron de Nov-Jorko? La ideo de barpafado do estas sensenca.

S-ro Rjuu: La manieroj de defendo progresas laŭ la manieroj de

atako. Sed troviĝas du demandoj tiurilate. Unua temas pri tio: sukcesa sindefendo en moderna milito postulas sammomentan alarmiĝon, kaj tamen la homa nervosistemo estas netaŭga por tio. Oni devas do apogi sin je elektrona kalkulilo. Sed se la kalkulisto erarprenus meteoron por misilo de la malamiko, kaj se oni forpafos kontraŭmisilajn misilojn, ili jam neniel povas esti reprenitaj apenaŭ la eraro estas rimarkita. Dua demando: atako ĉiam antaŭas defendon. Tio signifas, ke vera defendo en moderna milito jam ne estas ebla. Cetere, kontraŭmisila misilo estas teknike ebla, sed praktike la elspezoj por fari ĝin estas tiel ekstravagancaj, ke nuntempe troviĝas neniu efektiva plano por evoluigi ĝin. La diro, ke "atako estas plej bona defendo" implicas, ke la diferenco inter atakarmiloj kaj defendarmiloj fariĝis tiom granda, ke la "civila defendo" en moderna milito jam ne estas ebla. Iugrada defendo estus ebla por la fabrikoj kaj domoj disigitaj sub la grundo, sed ne eĉ Usono disponas financajn rimedojn por efektivigiti tian defendprogramon. La fakto, ke la jara buĝeto por civila defendo egalas la koston de unuopa *Atlas*-misilo pruvas, ke civila defendo en la vera senco fakte estas neplenumbla. Estas paradokso, ke la armila konkuro kreis epokon de "sen defendoj".

Prof. Jukaŭa: Antaŭ nelonge, la brita sciencisto, d-ro Bernal — kiu estas fizikisto kaj verŝajne socialisto — sendis al mi sian novan verkon. La ĉefpunkto estas, ke la scienco faris tiel grandan progreson, ke milito en la moderna tempo signifas homrasan sinmortigon. La aŭtoro kolektis konsiderindan materialon por montri, ke se ni kunvivus en paco, ni jam nun kapablus tuj alporti bonan vivon al ĉiu postrestinta popolo. Li asertas ke scienca progreso devas esti utiligita kiel bazo por fondi idealan mondon. Kun tiu lia vidpunkto mi plene konsentas, kvankam soci-ideologie mi ne tute akordiĝas kun li.

S-ro Rjuu: Keynes iam diris, ke la ekonomiaj problemoj de la mondo estos solvataj en la daŭro de venontaj cent jaroj. Sed liaj cent jaroj estus jam nun konsumitaj, se ĉio, kio nun estas uzata por armiloj, povus esti disponigita por la konstrucela produktado por paco.

S-ro Kaja: Ĉu oni ne povus diri, ke la problemoj estas plej prema kaj urĝa por Sovetio? Estas fakto, ke Sovetio surprizis la mondon per sputniko, sed la benoj de la scienco apenaŭ atingas la sovetan konsumanton. Ĉiuj specoj de tranzistoro, ekzemple, estas englutitaj en sputnikon, kaj ne eĉ unusola tranzistora radio-aparato estis aĉetebla kiam mi vizitis tiun landon. Homoj estis mirigitaj per unu, kiun mi kunportis el Japanujo. Surprizis min la manko de sciencaj instalaĵoj en Moskvo, kiuj havas la rektan ligitecon kun la vivo de la popolo. Ĉio foriris por defendo. Tial, ŝajnas al mi, ke la lando, kiu plej multe profitos el paco, estas Sovetio.

S-ro Rjuu: Sed oni iras en la kontraŭa direkto de paco. Oni parolas

pri "limigita" milito, tamen — ni ne bezonas Russel por diri tion — homoj ne povas resti kontentaj je duonefikaj militoj kaj la duonefikaj militoj certe fariĝos plenefikaj drastaj militoj. El ĉio, kio estas dirita, oni vidas, ke ni ankoraŭ ne havas definitivan solvon por internaciaj disputoj kaj la internacia tensio nur daŭras kaj ankoraŭ daŭros.

Prof. Jukaŭa: Certe. Tio rememorigas al mi la *Suicide Club* (Sinmortiga Klubo) de Stevenson. Ni ĉiuj vetkuras kvazaŭ por aliĝi sinmortigan klubon.

S-ro Maeda: Scienco kaj teknologio ĉiam antaŭeniras per grandaj paŝoj, sed la socia evoluo ne povas paŝoteni kun ili en la egala mezuro. La probableco de solvo de ĉiuj mondproblemoj estos nula tiel longe, kiel la politikistoj de la mondo nur manifestas parolojn laŭ la konvencia diplomatia taktiko. Ili kalkulas la avantaĝojn kaj malavantaĝojn kuŝantajn ĵus antaŭ sia nazo, kaj ne volas vidi en la estontecon je longa distanco. Sed mi opinias, ke la mondo jam alvenis ĉe grava turnopunkto. Eble oni ankoraŭ pluiros kelkan tempon kiel ĝis nun, sed baldaŭ oni trafos vojkurbon, kie oni devas ŝanĝi la direkton. El kompromisoj venas nenia solvo; ili eĉ venigus detruon de la mondo. Jam estas la tempo, kiam la gvidantoj de ĉi "akrevida" nacio serioze prikonsideru novan direkton.

Post la Dua Mondmilito naskiĝis la komuna deziro por konstrui pacan mondon. Sed tiu milito alportis kelkajn nenaturajn rezultatojn: la disdubiĝon de Germanujo, Koreo kaj Vjetnamo, kaj la kreiĝon de multaj malgrandaj nacioj. La finiĝo de koloniismo kaj la sendependiĝo de Azio kaj Afriko estas tre belaj aferoj, kompreneble, sed tio alportis ankaŭ kelkajn nedezirindojn. Naskiĝis nacioj, kiuj estas malfortaj kaj tamen havas abundon da naciisma emocio. Alivorte, tiu naciismo estas bazita sur malmultaj povoj ekonomia kaj politika, sed bazita sur multa emocio, kaj post ĝi la grandaj potencoj tiras per "fadenoj". Oni ne scias kiam tiu kaj tiu el tiuj nacioj kombiniĝos por ekflamigi fajregon.

Estas jam dirite, ke ni faris grandan teknikan progreson, sed antropologie kaj socie ni restas preskaŭ tiel same kiel antaŭe. Kaj tio portas en si ĝermojn de plej granda danĝero. Oni nepre bezonas fari decidan ŝanĝon en la manieroj de internacia politiko. La nacioj de la mondo, precipe la fortaj, devas forĵeti la malnovan nocion pri nacia suvereneco. Ne estos eble ke ili forĵetu la tutan nacian suverenecon, sed ne maleble, ke ili estu pretaj fordoni almenaŭ parton de ĝi en la manon de mondsuvereneco, aŭ kreota mondregistaro por mondfederacio. Tio faras la starigon de mondleĝo kaj mondregistaro urĝa bezono. Sen tio, mi opinias, ke certe venos la tago kiam la nacioj ne plu povos stari kiel nacioj — sen pere.

La politikistoj ĉe internaciaj konferenc-tabloj ne pritraktas la fundamentan solvon de mondproblemoj kaj ĉiam diskutas pri periferiaj aferoj.

Se paco vere devas esti konservita en la mondo, ni devas persvadi ilin, ke ili rigardu la aferojn el pli-vasta kaj -alta vidpunkto kaj faru klopodojn por solvi la problemojn de paco en maniero pli radikala. Por tio ni bezonas fari fortan manifestadon de volo — la volo ŝanĝi kaj ŝanĝigi la tutan koncepton pri la mondo. Mi ĝenerale konsentas kun Nehru kaj, kun li, malaprobas pasivan neŭtralismon. Kio estas bezonata, tio estas alpaŝo pozitiva kaj konstrua.

S-ino Ĵoodai: Mi kredas, ke la unua paŝo estu la malpermeso de nukleaj eksperimentoj kaj la likvidigo de atomarmiloj en la direkto de ĝenerala malarmado. Ni bezonas firme alteniĝi al tiu idealo. Ni devas diri al ĉiu, ĉie, ke tio estas la sola direkto, kiu kondukas nin al paco. Ni devas klopodi persvadi kaj konvinki ĉiun. Por tio, mi deziras, ke Japanujo estu ĉampiono, ke precipe la japanaj sciencistoj kaj virinoj laboru aktive. Ĉiam tenante nian idealon en la koro, ni faru proponojn, kiuj estas realismaj kaj konkretaj. Ni havu ankaŭ grandan paciencon kaj laboru persiste por tio.

S-ro Rjuu: Oni ofte parolas ankaŭ pri “paca kunekzistado”. Sed ni vidas ĉie malfidon — ĉie, eĉ inter la tria-partiaj nacioj. Cetere, oni ne montras, nek havas klaran ideon, kien tia kunekzistado kondukas. Bela parolo pri paco; sed la aktuala stato temas ĉiam pri ekvilibro de timoj. La plej granda timo regas inter la du grandpotencoj. Tie la ekvilibro de timoj estas tenata per ekvilibro de superfortoj. Mi ne volas diri, ke la ideo de paca kunekzistado estas neutila, sed ĝi estas sufiĉe supraĵa. Al ĝi mankas programo pli daŭra kaj firma. Laŭ tia paca kunekzistado neniam malaperos la minaco de milito.

Prof. Ĵukaĵa: La grandpotencoj jam vidas tiun dilemon. Sed ilia reciproka malfido malhelpas, ke ili plibonigu la situacion. Tial plej konvenas al tia nacio kia Japanujo fari apelacion al la mondo jam per baza programo por ĉesigo de eksplodeksperimentoj kaj likvido de la atomarmiloj.

S-ro Ŝimonaka: Vere, Japanujo estas ideala nacio por plenumi ĝuste tiun taskon.

S-ino Uemura: En tiu tasko la malgrandaj nacioj devas kunlabori. Tio estas la privilegio lasita en iliaj manoj, ĉar la grandaj potencoj estas tro okupitaj en la fanatika arm-konkurado por ke ili konsideru ĝin.

S-ro Rjuu: Tiu tasko entenas multajn malfacilajn problemojn. Sed la problemojn oni ne povas solvi per nura citado de malfacilaĵoj. Cetere mi ne kredas, ke ni bezonas atendi la solvon de tiuj malfacilaĵoj antaŭ ol fari antaŭenmarŝon. Tamen ni bezonas antaŭ ĉio solvi la problemon, kiel transigi nacian armadon al internacia organizaĵo. Mi volas demandi viajn opiniojn pri la kreo de tia internacia organizaĵo.

S-ro Ŝimonaka: Ni, mondfederalistoj jam havas kelkajn planojn. Ekzemple, en la Unuiĝintaj Nacioj estu fondita popola parlamento, aŭ

mondparlamento, kiel la integra parto de tiu Organizaĵo. La Supera Ĉambro konsistos el la membroj-ŝtatoj de la UNO, kaj la reprezentado en la Malsupera Ĉambro estu farita ne laŭ naciaj unuoj, sed laŭ la popoloj de la mondo. Tiuj du Ĉambroj kune konsistigos la mondparlamenton. La problemon pri la distribuado de seĝoj oni proponis solvi jene: po reprezentanto por ĉiu duonmiliono da loĝantoj, kaj eĉ la plej malgranda nacio povas havi unu reprezentanton. Tio signifas, ke nacio kun miliono da loĝantaro povas havi du reprezentantojn, nacio kun du milionoj da loĝantaro povas havi kvar, kaj tiel plu. Tiumaniere, Hindujo havos dek reprezentantojn, Ĉinujo dek unu, Usono kaj Sovetio naŭ, respektive, kaj Japanujo, Pakistano kaj Indonezio ok, respektive. Kvankam tiu propono ne estis akceptita ĉe la Kopenhaga Kunsido. Sed lastatempe, Grenville Clarke proponis kompromisan planon, laŭ kiu oni povas atingi la samon laŭ ses-sep paŝoj. Nacio kun cent milionoj da loĝantaro, havos kvin membrojn, kaj nacio kun kvin cent milionoj dek. La reprezentantoj povas esti elektitaj tuj kiam ties kvalifikoj estas determinitaj. Prepara konsilo estos fondita en la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi verkos projekton de mondkonstitucio.

S-ro Rjuu: Ĉu do la problemo estas jam prepari la kunsidon de prepara konsilo?

Prof. Ĵukaĵa: Fakto estas, ke ĝuste tia kongreso okazis la lastan someron en Nederlando: tiu de la Unuiĝo de Mondfederalistoj. Mi tiam estis en Eŭropo kaj ĉeestis ĝin por observi. La komunistaj landoj ne estis reprezentitaj, kaj la problemo kiel aliĝigi ilin ŝajnis la plej malfacila. Britujo kaj Usono estis plej entuziasmaj, kaj aparte kelkaj membroj de la angla parlamento. Sed la grandaj potencoj ne deziras meti sin en la pozicion de iniciatanto. Kvankam ili komprenas la gravecon de la afero, ili preferas ke la malgrandaj nacioj gvidu ĝin. Tial la iniciativo por la fondo de mondregistaro kaj la vojmonro por la grandaj nacioj estas kvazaŭ lasitaj en la mano de malgrandaj nacioj, egale ĉu de la komunista tendaro, ĉu de la “libera” tendaro.

S-ro Rjuu: Tio donas al ni la plej grandan perspektivon por la sukceso de la afero.

Prof. Ĵukaĵa: Oni atendas multon el Japanujo. Oni scias, ke la mondfederacia movado estas treege vigla en Japanujo, ke la bazo por tio jam estas metita — ke Japanujo estas la plej decidiĝinta el ĉiuj nacioj por aboligi atomarmilojn. Tial Japanujo devas starigi programon por tio kiel la integran parton de sia nacia politiko.

S-ro Hidaka: Ni, mondfederalistoj scias, ke troviĝas du manieroj de alpaŝo. Unu estas plifortigi la organizon de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la alia estas rekte iri al la fondo de mondregistaro. Ĉi tiu lasta maniero bezonas apogon de la popola movado tra la mondo. Fakte, organizaĵo por

krei respublikon de la popoloj de la mondo jam estas fondita la antaŭlastan jaron en Londono. La movado estas sufiĉe vastigita en diversaj landoj kaj entuziasme subtenata de famaj sciencistoj kaj inteligentuloj. Sed ĝi ankoraŭ ne havas sufiĉan influovon por instigi registarojn. Ĝi ankoraŭ ne levis sin je gvidanteco.

De nun la malgrandaj nacioj de Azio kaj Proksima Oriento pli multe manifestu sian volon, kiel ili faris ĉe la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj. Por tio ili bezonas fari ŝanĝon al sia naciisma pensmaniero.

S-ro Ŝimonaka: Norman Cousins plurfoje sugestis, ke Japanujo faru proponon. Li diras eĉ, ke nur Japanujo povas solvi la diferencojn inter Usono kaj Sovetio.

En tiu Japanujo — jam 145 urboj kaj kvin prefektujoj — Hukuoka, Ŝizuoka, Nagano, Iŝikaua kaj Tojama — faris deklarojn por subteni la mondfederalismon. Ili reprezentas entute dudek milionojn da japana loĝantaro. La nombro ĉiam ankoraŭ kreskadus. Kiam ĝi atingos la plimulton de la japana loĝantaro, tiam Japanujo kiel nacio pledos por la starigo de mondfederalismo: la japana registaro ekagos*).

Prof. Jukaŭa: Mi eble estas trozorgemulo, sed vidas grandajn malfacilaĵojn sur la vojo al mondfederacio. Sed se la mondo falus en abismon de nesavebla situacio, tiam estos jam tro malfrue por Japanujo aŭ iu alia nacio, ke ĝi adoptu mondfederalismon kiel nacian politikon. Tial nun estas la tempo por tia nacio kia Japanujo, ke ĝi starigu sian ŝtatprincipon surbaze de la celado de mondfederalismo.

S-ro Rjuu: Resume parolante, ni ankoraŭ staras antaŭ la granda probableco, ke oni paŝus la vojon al milito. Tio signifus la finon de ĉio. Se iuj transvivus la katastrofon, tiam, nur tiam ili organizus mondfederacion. Do pli bone, ni organizu jam nun la mondfederacion antaŭ ol tia katastrofo trafos la homaron. Ne gravas, ke la ideo de mondfederacio ankoraŭ ŝajnas ne-tre praktika; gravas la fakto, ke ĝi prezentas unu manieron, laŭ kiu la mondo ankoraŭ povas eviti militon, kaj kiu donas fidon, ke la homaro ankoraŭ disponas almenaŭ unu rimedon de mondsavo.

S-ro Maeda: Nia diskutado pritraktis ĉion iom tro simple. Se oni ĉeestas kaj observas la internaciajn konferencojn, oni facile vidas, ke ĉiuj aferoj ne iras tiel glate kiel ni diskutis. Precipe ĉe kunsido de la spertoplenaj politikistoj kaj diplomatoj, kiuj havas la multjarajn tradiciojn de nacia suvereneco kaj de internaciaj rilatoj, nia propono pri mondfederacio

*) Laŭ enketo je julio 1959, ok japanaj prefektujoj kaj 171 urboj, urbetoj kaj vilaĝoj kun ĉ. dudek milionoj da loĝantoj estas mondanigitaj. La japanaj mondfederalistoj bezonas kvarcent kvidek milionojn, aŭ la duonon de la japana loĝantaro por premi, ke la japanaj registaro kaj parlamento faru ŝtatan deklaron por mondfederalismo. — Noto de la Trad.

estos akceptita kiel ridinda ŝercaĵo. Sed kion ni devas frakasi antaŭ ĉio, tio estas ĝuste tia cinikisma pensmaniero, laŭ kiu oni ridindigus nian proponon.

S-ro Rjuu: Ŝajnas ke ni jam devas fari konkludojn. Troviĝas la problemoj de la senbrida evoluigo de atomarmiloj unuflanke, kaj la problemoj de danĝeroj estiĝantaj el la skizistado de multaj malgrandaj nacioj. Tiuj estas nur du el la longa serio da problemoj, por kiuj ni havas ankoraŭ nenian solvon. Sed la plej urĝa demando estas kiel evitigi la danĝeron de milito. Kiel s-ro Maeda diris, ĉiu ajn fundamenta maniero de solvo renkontos la mokojn de multaj ŝtatviroj kaj diplomatoj; kaj tamen kiel individuoj, ekzemple, Macmillan kaj Nehru montras sin tre favoraj al mondfederalismo. Ili principe favoras ĝin, sed praktike ili estas devigataj pritrakti tiujn problemojn laŭ tute alia maniero — la maniero de konvencia realismo. Kaj tamen inter la popoloj de Eŭropo jam troviĝas multaj homoj, kiuj atendas, kiel d-ro Jukaŭa diris, ke tia nacio kia Japanujo prenu la iniciativon kaj montru la vojon al la mondo. Ankoraŭ neniu tia nacio troviĝas. Ĉie la politiko estas bazita sur konvenciaj manieroj. Do, iu nacio, ne individuaj personoj kaj grupoj, sed iu nacio kiel politika unuo devas adopti la principon de mondfederalismo en la kernon de sia eksterlanda politiko. Mi pensas pri Japanujo.


Japanujo ankoraŭ ne havas sian propran politikon por la eksterlando. La “porpaca eksterlanda politiko” kaj la “eksterlanda politiko ligita kun la Unuiĝintaj Nacioj”, kiujn oni ofte parolas kiel sloganojn, ne faras politikon en la vera senco de la vorto. Ili nur priskribas la cirkonstancojn, en kiuj Japanujo sin trovas nuntempe. Ili kondukas al nenio konkreta. Se Japanujo proponos por mondpaco ne sole la principon de paca kunekzistado, sed ankaŭ la konkretan programon pri mondfederacio kiel la ŝolan solvrimedon de ĉiuj mondproblemoj, tiam Japanujo la unuan fojon ekhavos sian propran politikon internacian, kun kiu ĝi povos sin turni kaj al Usono kaj al Sovetio.

Tiurilate Japanujo jam havas certajn kvalifikojn de ideala nacio, por ke ĝi iniciatu la proponon de mondfederalismo: ĝi travivis la terurojn de la atombomboj, ĝi decidis en sia nacia konstitucio la abolon de milito, ĝi havas nenian planon por rearmado, kaj plie, ĝi havas la valoran sperton en la pasinteco: antaŭ jarcento ĝi estis sukcesinta ŝanĝi sian feŭdisman socion en la modernan. Se tiu Japanujo nun adoptos ion similan al la Deklaro de la Seppersona Apelacia Grupo kiel la fundamentan principon de sia internacia politiko, tio estos granda kontribuo por la paco de la mondo ĝenerale.

S-ro Maeda: Sed la motora forto devas esti bazita sur la fundamenta respekto de homaj rajtoj kaj sur amo — kvalitoj ne tre abundaj en la nuntempa Japanujo. Tio estus grava manko. Tion ni ne forgesu; dum ne ni faru ĉion eblan por la efektiveco de nia idealo. (Trad. T. Nakamura)

Longdistanca marŝo de la japanaj pacbatalantoj: al Hiroŝima

Por la 5-a Monda Kongreso por Forigo de Atomarmiloj



La 5-a Monda Kongreso por Forigo de Atomarmiloj havos lokon en Hiroŝima dum unu semajno: 1-7 aŭg. 1959, kun la celo urĝi la grandpotencojn, ke ili ellaboru internacian kontrakton pri la malpermeso de atomarmilaj eksperimentoj kaj atomarmado.

Por intensigi la movadon cele al la Kongreso kiel la kulminpunkto, la Japana Konsilantaro Kontraŭ A- kaj H-bomboj decidis lanĉi Dumonatan Kampanjon — de 10 junio ĝis 7 aŭg. — per specialaj programoj de tutlanda manifestacio.

Unu grava el tiuj programoj estas la longdistanca “pacmarŝo” al Hiroŝima. La 10-an de junio du grupoj de pacmarŝantoj startis de Tokio kaj Niigata, respektive (vidu apudan landkarton) kaj 13-an de julio — post marŝado en la distanco de kvincent kelkdek kilometroj — ili atingis Kioton, kie ambaŭ grupoj unuobliĝis. Nun (25 julio) la granda vigla procesio, spite la intensan varmegon de la somero, daŭrigas la marŝadon por konkeri la distancon de 380 km inter Kioto kaj Hiroŝima.

La alia, 3-a, grupo startis la 1-an de julio el Kagoŝima en Kjuŝu, kaj nun estas survoje al Hiroŝima. La distanco inter Kagoŝima kaj Hiroŝima estas 550 km.

La marŝantoj estas el ĉiuj sociaj tavoloj kaj el ĉiuj profesiaj kategorioj. Ilia nombro estas nekalkuleble granda, ĉar la procesian marŝon de la tri nomitaj grupoj dumvoje partoprenas lokaj volontuloj kaj reprezentantoj alsenditaj el foraj regionoj. Inter ili troviĝas ankaŭ lokaj membroj de UHA kaj esperantistoj kun la verdstela standardo (vidu en la foto). Ĉie, kie ili ĉiuj marŝas, la urbanoj kaj



La marŝo-grupo el Niigata estis bonvenigita kaj kuraĝigita, kiam ĝi noktiĝis en la Domo de Oomoto-Virina Asocio, Kameoka (12 julio).

Letero por konsolo al “militviktimo” en Usono

Kun ĉiuj aktivaj kaj agemaj pacistoj de la mondo ni daŭrigas kaj daŭrigos kontraŭ-armadan kampanjon ĝis la tago, kiam la mondo fariĝos sekura kaj paca loĝejo por la tuta homaro. Dum tiu kampanjo daŭras, ni ofte publikigas raportojn kaj artikolojn pri la movadoj ankaŭ kontraŭ la uzo de atom- kaj hidrogen-bomboj. Sed per tio ni neniel celas pafi kalmuniajn sagojn al iuj specifaj individuoj de kiu ajn ŝtato aŭ al la popolo

de iu specifa nacio. La *malamikoj*, kiun ni batalas por ekstermi, estas la militismo, kiu ankoraŭ regas la mondon.

Tial estas kun profunda sento de bedaŭro kaj kompato, ke ni legis la depeŝon de AP (11/aprilo) el Dallas, Texas, Usono, ke Claude R. Eatherly, 40-jara eksmajoro de la usona aerarmeo, kiu iam pilotis la aviadilojn ŝargitajn per atombomboj super Hiroŝima kaj Nagasaki, mensmalsaniĝis pro sia propra konscienc-riproĉo. Laŭ la

vilaĝanoj, viroj kaj virinoj, knaboj, knabinoj kaj infanoj ovacias ilin. La lokaj ĵurnaloj kaj stacioj de la televido kaj radio raportas la stadian progreson de la marŝoj.

La pacmarŝantoj venos ankoraŭ el multaj aliaj direktoj kaj laŭ aliaj manieroj. Ek-e, la 25-an de julio, 4 junuloj de la Oomoto-Junulara Asocio, Kameoka, startis en bicikla grupo por atingi Hiroŝima per 11 tagoj da biciklado laŭ tute alia vojo. Tamen ĉiuj iliaj grupoj unuiĝos ĉe Hiroŝima en unu grandan forton por la komuna celo: por estiĝi grandan *tajdon* kontraŭ la uzo de A- kaj H-bomboj kaj por la mondpaco, kaj tiel por plenumi la celon de la nuna Kongreso. La Japana Konsilantaro antaŭkalkulas la nombron de la popolamaso, kiu aliĝos la Dumonatan Kampanjon, je pli ol 10 milionoj.



Parto de la pacmarŝantoj sur strato de la urbo Nagoja (4 julio). En la mezo iras la Esperanta standardo, portata de la malnova s-ano Ĉuunoŝin Jubi, la estro de Japana Sekcio de Mondpaca Esp-ista Movado, kaj ĉirkaŭita de kelkaj samideanoj de la Esp-Societo de Nagoja.

distrikta prokuristo Henry Wade, Eatherly diradas, ke li mortigis 100,000 japanojn kaj kredas, ke japanoj atencas lian vivon.

Tiu ĉi sciigo aperis en la ĉefaj ĵurnaloj en Japanujo. Leginte ĝin la japana pacista grupo, YUWA-KAI*), aŭ la Japana Sekcio de *International Fellowship of Reconciliation* (Internacia Fratara por Repacigo) sendis leteron por konsoli la suferantan ekspiloton. El ĝi ni citas en nia traduko kelkajn paragrafojn:

“Ni estas instigitaj skribi al vi tiun ĉi leteron pro la novaĵo aperinta en niaj ĵurnaloj kaj informanta laŭ la depeŝo el Dallas, Texas, ke post la bombado sur Hiroŝima vi suferas de kulpo-sento tiel severe, ke vi fariĝis mensmalorda kaj devis esti enhospitaligita lastatempe por kuracado.

“Per tiu ĉi letero ni sendas al vi nian varman kaj sinceran simpatian. Ni kredas, ke vi nur agis aŭ sub la ordono de viaj superuloj, kiun vi ne povis malobei aŭ sub la milit-psikologia impulso, en kian viro kaj virinoj de ĉiu lando estas puŝataj dum milita tempo kaj sub kiu ili sin okupas en honora, malhumana agado ne sciante, kiajn rezultojn tio alportos. Kio kondukas la homojn en tian tragikan situacion, estas nenio alia, ol la barbarisma institucio nomata “milito”. Nu urĝas nin, ke por la pluvivado de la homaro ĉiuj niaj klopodoj, klopodoj de ĉiuj homoj en ĉiuj landoj, estu direktitaj

por fini tiun eksmodiĝintan sovaĝan institucion.

“Kun tiu ĉi letero venas al vi nia varma simpatio kaj fervora preĝo, ke vi rapide resaniĝu de la stato de mensa malordo. Bonvolu scii, ke ni rigardas vin kiel unu el la viktimoj de milito, tute samaj kiel la vunditoj dum la milito, kaj preĝas por via kompleta resaniĝo. Ni preĝas ankaŭ, ke la tago venu, kiam vi, pardonante ĉiujn malbonojn faritajn de ambaŭ partioj en la pasinteco, aliĝos la kampanjon de bonvolo kaj laboros por starigi pacan mondon — mondon de interakordiĝo kaj amo”.

*

La foto montras: Claude Eatherly, sendita al hospitalo. La eltondaĵo de usona loka ĵurnalo estas sendita de nia usona amiko.



AP Wirephoto
CLAUDE EATHERLY
Committed to hospital.

Hiroshima Pilot In Mental Ward

DALLAS, Tex., April 11.—(AP)—Claude R. Eatherly, who led the atomic bombers over Hiroshima and Nagasaki and claims he thereby killed 100,000 Japanese, was given a 90-day mental commitment Friday.

Dist. Atty. Henry Wade also says Eatherly believes Japanese seek to kill him.

The World War II pilot has been held several weeks on charges of attempting to rob a drive-in grocery.

Eatherly, 40, a tall, pleasant former Air Force major, flew reconnaissance B29s acting as pilot planes for the atomic bombings.

*) Grupo de ĉ. 300 prokonsciencaj militrezistantoj, plejparte kristanaj.

(De p. 117)

devenantaj el pasintaj jarcentoj?

Ni, paccelantaj batalantoj, ni ne povas konsenti al limigado de scienco je arte-

faritaj kadroj, ĉar la progreso de scienco prezentas komunan intereson kun la problemo de paco kaj tuthomara interkompreniĝo.

Eug. Jasiewicz (Varsovio)

Falsigado de scienco — Kontraŭpacema Ago

La daŭrigo de Paco bezonas tutmondan interkompreniĝon, tial la interŝanĝo de opinioj rilatigas homojn kaj ebligas reciproke interkonatiĝon. Ĉi lasta kondukas al Frateco kaj interpopola Amikeco, kiuj plifortigas Pacon.

Kia povas esti la plej grava tasko por alveni al vera interkompreniĝo de ĉiuj homoj? Mi pensas ke unua tasko estas plialtigo de homa konscio. Ĉu ne? Se ni konsentus, ke la plialtigo de homa konscio kondukas al interkompreniĝo, unueco kaj Paco, ni povas esplori la temon, la plej konstruan kaj vere sciencan, nome: kio estas la homo mem?

Mi pensas, ke homo kaj lia valoro devas esti la ĉefa problemo, kiu indas nepran solvon. Ĉiuj problemoj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj sen la problemo de homo estas nesolveblaj.

Ni primeditu: ĉu interhomaj rilatoj pliboniĝis, ĉu la homo mem ŝanĝiĝis en sia pensado, se homoj fakte restis kun la samaj bestaj instinktoj?

Ekzistas multe da abstraktaj esprimoj, uzataj kiel io sankta kaj certa. Sed fakte ĉi abstraktaĵoj estas ofte *senenhavaj* kaj nekompreneblaj. La homoj al kutimiĝis ilin nur sencepe ripetadi.

Ni tuŝu kelkajn psikologiajn problemojn. Nome, ni scias, ke en kreado de ĉiuj produktaĵoj por konstruado, industrio, arto kaj kulturo niaj imagoj prezentas formantajn faktorojn.

Tial estus preferinde solvi la jenajn demandojn:

1. Ĉu ni kreas imagojn per nia cerbo?
2. Se ni imagas ian movon en nia konscio — ekz. la turniĝanta helicon de aviadilo aŭ la alojn de muelilo aŭ la indikilojn sur horloĝa cifereplato — ĉu tiu imaga

movo havas ion komunan kun funkcio de ĉeloj en nia cerbo, t. e. ĉu tiuj ĉeloj ankaŭ turnas sin ĉirkaŭ ia centro?

3. El kia materio konsistas niaj imagoj?
 4. Kiaj ecoj distingas imagojn de ordinara substanco?
 5. Kiamaniere rilatiĝas spaco kaj tempo al imagoj — t. e.
 - a. ĉu imagoj posedas apartan spacan, sendependan de la ĉirkaŭanta nin fizika spaco?
 - b. ĉu homaj imagoj regas super momentoj de ordinara kuranta tempo, posedante ilian propran tempon, sendependan de la mezuratoj per horloĝaj minutoj, horoj aŭ kalendaraj tagoj, semajnoj kaj jaroj?
 6. Ĉu nia memoro havas ion komunan kun ĉeloj de homa cerbo?
 7. Kial ne estas farataj esplor-eksperimentoj koncerne telepation, bilokacio, levitacio, kriptestezio, eksperimenta retroigo de homa memoro, impozio ktp.?
- Tendencema elimino de tiuj faktoj, havantaj multajn asertantojn, falsigas la sciencan, farante ĝin subjektiva kaj unuflanka. Evito de honesta, sentendencema, scienca esploro de ĉi faktoj prezentas falsigadon de vero, tiel ke la vera realeco de homo restas plue en mallumo.
- Kiamaniere la konsento inter homaro, blindigata per malprava perforto super scienco, povas alveni? Ĉu la disfomado de vera bildo de realeco por forigi la objektivan scion pri homo povas krei veran kulturon, interkompreniĝon kaj Pacon? Dubinda estas tiela afero!
- Kial havi la sciencan falsigatan, anstataŭ objektivan? Kial la scienco devas esti malprogresema pro ĉiama ripetado de malnoviĝintaj opinioj (Al p. 116)

VOJAGPROGRAMO

de

S-ro Eizo ITOO,

Reprezentanto de Oomoto,

en Eŭropo

S-ro E. Itoo la 22-an de Julio forflugis al Eŭropo de Haneda-aerhaveno, Tokio.



(Unua parto ĝis Decembro)

Monato	Dato	Loko	Adreso por kontakto
Julio	20	Forveturo Kameoka	
"	"	Alveno Tokio	
	21	Restado Tokio	
	22	Forveturo Tokio (12:30 p.m.)	
	23	Alveno Kopenhago (7:30 a.m.)	
	24		
	27	Restado en Kopenhago	ĉe S-ro Ib Schleicher, Ved Bellahøj 30, B-Kopenhago BRH, Danlando
	28	Forveturo Kopenhago	
	"	Alveno Varsovio	
Aŭgusto	7	Ĉeesto en Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio	ĉe La 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, Pollando
	8	Forveturo Varsovio	
	9	Alveno Höör—Frostavallen	
	9		
	16	Ĉeesto en Sveda Somera Semajno	ĉe S-ro Jan Strömne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo
	16	Forveturo Malmö	
	17	Alveno Amsterdam—Oosterbeek	
	18		
	22	Ĉeesto en la Jarkunveno de Mondfederalistoj	ĉe World Association of World Federalists, Burg, Parijnlaan 49, The Hague, Nederlando
	22	Forveturo Oosterbeek	
	"	Alveno Bergen-op-Zoom	
	23		
	24	Restado en Bergen-op-Zoom	ĉe S-ro Wed. C. Dercks, Antwerpsestraat 43, Bergen-op-Zoom, Nederlando
	25	Forveturo Bergen-op-Zoom	
	"	Alveno Wattlelos	
	26		
	27	Restado en Wattlelos	ĉe S-ro L. Giloteaux, 7/44 rue Saint Saens, Wattlelos (Nord) Francujo

	28			
	30	Vizito	al Antverpeno (ne fiksita)	
	1	Forveturo	Antverpeno (aŭ alie)	
	"	Alveno	iu urbo en Nederlando	
Sept.	1	Prelegvojaĝo	en Nederlando	ĉe S-ro E. de Wolf, Joh. de Breukstr. 18, Haarlem, Nederlando
	12			
	13	Forveturo	Amsterdam	
	14	Alveno	Oslo	
	15	Forveturo	Oslo	
	16	Alveno	Stockholm—Turku (17-a)	
	18	Prelegvojaĝo	en Finnlando	ĉe S-ro Joel Vilkkilä, Somero, Finnlando
	30			
Okt.	1	Forveturo	Somero	
	2	Alveno	Stockholm	
	2	Prelegvojaĝo	en Svedujo	ĉe S-ro Jan Strömne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo
	14			
	15	Forveturo	ie en Svedujo	
	"	Alveno	Oslo	
	16	Prelegvojaĝo	en Norvegujo	ĉe S-ro C. Støp-Bowitz, Boks 942, Oslo, Norvegujo
	26			
	27	Forveturo	Oslo	
	"	Alveno	ie en Svedujo	
	27	Prelegvojaĝo	en Svedujo	ĉe S-ro Jan Strömne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo
Nov.	2	Forveturo	dua parto	
	3	Alveno	Kopenhago	
	6	Prelegvojaĝo	en Danlando	ĉe S-ro A. Holst, Tagensvej 256, N. V. Kopenhago, Danlando
	15			
	16	Forveturo	ie en Danlando	
	"	Alveno	Flensburg	
	17	Restado	en Flensburg	ĉe S-ro F. Moravec, Flensburg-Murwik, Twedterholz 15, Germanujo
	19			
	20	Forveturo	Flensburg	
	"	Alveno	Kopenhago	
	21	Restado	en Kopenhago	ĉe S-ro Ib Schleicher, Ved Bellahøj 30, B-Kopenhago BRH, Danlando
	22			
	23	Forveturo	Kopenhago	
	"	Alveno	Londono	
	24			
Dec.	26	Restado	en Londono	ĉe S-ro D. M. Worcester, 104 Coleraine Road, Blackheath, London, S. E. 3

Provizora projekto post Londono

Germanujo (Dec.)—Svisujo—Aŭstrujo—Hungarujo—Jugoslavujo (Jan.)—Italujo—Francujo—Hispanujo (Feb.)—Portugalujo—Usono (Marto)—Japanujo (Aprilo)

Du Diskriktaj Esp-Kongresoj en Japanujo

La 7-a Kongreso de Esperantistoj en Kansai-Distrikto okazis la 10-an de majo, en la Domo de Rakuju-Kaikan de Kioto Universitato, Kioto. Favorate de la serena vetero, kolektiĝis 170 gesperantistoj el Kansai-distrikto. Partoprenis ankaŭ kelkaj samideanoj el Tokio kaj Nagoja.

La Kongreso pritraktis du proponojn kaj decidis: 1) subteni per ĉiu rimedo la planitan eldonon de la "Nova Japana-Esperanta Vortaro", nun reviziata kaj kompletigata: nome, per starigo de la eldona fonduso kaj per varbado de aĉetontoj, k. s.; 2) okazigi la venontjaran Kongreson de Kansai-Distrikto en la urbo Suita, laŭ la invito de tiea Esp-grupo.

Posttagmeze, okazis la Oratora konkurso por kvar junuloj. Ĝin sekvis du prelegoj: unu de d-ro Hideki Jukaŭa, mondfama fizikisto kaj prof. de Kioto Univ., pri la temo "Esperanto kaj la estonta mondo", kaj alia de s-ro Ŝihej Mijake, direktoro de Japana Esp-Instituto, temanta pri "La centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kaj Esperanto-Movado".

D-ro Jukaŭa en sia parolado akcentis, ke la mondo nun bezonas du gravajn aferojn: unu estas Mondfederacio kaj la

alia Internacia Lingvo kiel dua lingvo por ĉiu. Li vidas en Esp-o brilan estontecon kaj konkludis, ke la sukcesigo de tiuj du aferoj estas la devo de ĉiu moderna homo.

S-ro Mijake, en mallonga tempo, pritraktis diversajn faktorojn el la mond-historio antaŭ kaj post la apero de Esperanto, kaj konkludis, ke la Esperanto-Movado komenciĝis jam ekde la tempo de la naskiĝo de Zamenhof.

Post la prelegoj okazis la amuza programo: unue, la teatraĵo "Sub la verdstela flago" prezentita de Esp-klubo en Niŝinomija-Altlernejo kaj due, la ĥor-konkurso kiun partoprenis kvar grupoj.

La Kongreso fermiĝis je la 17-a kun la ĥoro "Tagiĝo".

*

La 8-a Kongreso de Esperantistoj en Kanto-Distrikto okazis du tagojn en Jokohama: 31 majo — 1 junio, 1959. Partoprenis ĉ. 80 gesamideanoj. Ni ricevis informon, ke en la unua tago la kongresanoj unuanime aprobis la jenan rezolucion, kiun proponis s-ro K. Matumoto en la nomo de *Merkreda Kunsido* de Tokio.



La 7-a Kongreso en Kansai-Distrikto

Rezolucio

Celante vekti kaj plifortigi la publikan opinion de la mondo kontraŭ la uzado de ĉiaspecaj nukleaj armiloj, ni, la kunvenantoj de la 8-a Kongreso de Esperantistoj en Kanto-Distrikto, la 31-an de majo 1959, unuanime decidis:

1) klopodi per nia komuna lingva rimedo funde konigi al ĉiuj homoj sur la tero la terurecon de nukleaj armiloj, precipe la kruelajn postefikojn de radioaktivo nekuraceblajn, kaj

2) por agi konforme al la supra paragrafo, dissendi al niaj alilandaj korespondantoj tiucelajn materialojn, kiel, ekzemple,

- a. *La Belan Pacon* de Senzi Yamaguti, tradukita de Ter. Isiguro kaj eldonita de JAŬDA RONDO, Sugamo 7-1662, Tokio (prezo: 2 int. resp-kup.)
- b. *Oomoto*, n-roj 215-216, 219-220
- c. *Scienca Revuo*, Vol. 10-a, n-ro 2-3, 1959. Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esp-ista (ISAE); eld. de J. Muusses, Purmerend, Nederlando. (Jarabono: 30 steloj)
- ĉ. *Infanoj de l' Atombombo*, kompilita de d-ro Arata Osada, trad. de KLEG; eld. de Japana Esperanta Libro-



Kelkaj samideanoj tranoktis interparolante kaj -babilante pri "gravaj" aferoj. De maldekstre, laŭ la horloĝa ciferordo: s-anoj Ŝihej Mijake (dorsa), Ziro Kitahara, Naomiĉi Oka, Teiĉi Takagi, Ŝigetoki Satojoŝi, Ter. Isiguro (fronta) kaj Masao Fukuda.

- Kooperativo, Nakatu-hamadori 2-20, Oyodo-ku, Osaka. (prezo: 150 jenoj)
- d. *Kun la kadavro de l' edzino* de Toyohumi Ogura, trad. de Sadami Tanaka, eld. de Libro-Kooperativo, supre-menciita. (Prezo: 120 jenoj)
- e. *Pikka Dong*, bildrakonto de Toŝiko Akamacu, eld. de Libro-Kooperativo. (Prezo: 35 jenoj)
- f. *Hiroŝima* (fotoj), eld. de Libro-Kooperativo (Prezo: 35 jenoj).



La 8-a Kongreso en Kanto-Distrikto

Esperanto rolas kiel fremdula lingvo en japana filmo

"La Sturmo de Johano Arima"

Ne konforme al sia destino Esperanto estis uzata antaŭ pluraj jaroj, kiam la usona armeo aplikis ĝin kiel la lingvon de "agresa" taĉmento, aŭ supozita malamiko, en la manovroj; kaj ankaŭ kiam oni uzis ĝin en la filmo "Falinta el la ĉielo", kiel la lingvon el nekonata regiono — nur por kelkaj dialogoj. Lastatempe ĝi estis multe uzata en japana filmo por roli kiel alinacia lingvo, aŭ pli ĝuste, por anstataŭi unu specifan el la eŭropaj lingvoj.

La Kioto-Studio de *Daiei*, mondfama per la "Raŝomon" de Akira Kurosawa kaj kelkaj aliaj filmoj premiitaj en internaciaj film-konkursoj, ĵus produktis novan verkon sub la titolo "La Sturmo de Johano Arima". La scenario estis originale verkita mem de la reĝisoro Daisuke Itow. Ĝi estas fikcia rakonto pri japana kolizio kun la eŭropaj koloniistoj en la oriento, parte bazita sur historia fakto, okazinta antaŭ 350 jaroj. Por ke tia historiaĵo ne kaŭzu malagrablan impreson internacie, la



Klara (iberia-japana hibrido) rolata de usonanino, kaj la heroo *Johano Arima*

reĝisoro Itow faris la zorgon anstataŭigi ĉiujn proprajn nomojn per la fikciaj kiel (poste tradukite), ekz-e, Don Sebastiano de Matoso, la generalgubernatoro de Ĉukjang, la ekstremorienta kolonio de la Reĝlando Iberio; iberia ŝipo "La Patrino de Dio"; Kapitano Kastro; Komandanto Mirando, k. t. p. Sed la problemoj estis: Kiun alian lingvon, ol la efektivan, ili uzu en la filmo?

S-ro Itow ekhavis la ideon pri apliko de Esperanto, tamen li hezitis esprimi sian opinion, pensante ke ĝi estas iom tro originala. Sed ĉe staba konferenco de la kinokompanio okazis ke s-ro Nobuo Miura, estro de la studio kaj la produktisto de tiu ĉi filmo, proponis unua la ideon pri uzo de Esperanto. Ĝin s-ro Itow tuj subtenis kaj la stabo unuanime aprobis.

Por orientiĝo rilate Esperanton, oni sin turnis al prof. Tadao Umehao de Osaka-urba Universitato, kiu, siavice, direktis la aferon al Kansai-Ligo de Esperantistaj Grupoj. S-roj Masao Mijamoto kaj Tacuo Huĝimoto de la Ligo kunlaboris pretigi la Esperantan parton. Kaj en la daŭro de ses semajnoj — s-ro Huĝimoto devis frekventi la studion aŭ veturi kun la filmsteloj por loka filmado, tiel ke li estu ĉiam preta surloke gvidi la esperantan parton kaj la *Esperante*-parolontajn "iberianojn". La "interpretiston" kaj aliajn rolojn ludis la japanaj profesiaj aktoroj, sed la rolon de "iberianoj" ludis la ne-japanoj, amatoraj aŭ duonprofesiaj, kiuj estis dungitaj speciale por tiu ĉi filmo. Laŭ s-ro Huĝimoto, ili kutime ricevis esperantan dialogtekston matene, kaj jam elparolante la papage parkeritajn vortojn kaj frazojn. Tio devigis, ke ĉiuj dialogoj

estu kiom eble plej mallongigitaj en la esperanta teksto. Krome, la fundamenta vorto "jes" devis esti nepre evitata laŭ la sugesto de la reĝisoro, kiu konsideris ĝian prononcon "tro familiara por esti fremdula lingvo". Malgraŭ ĉio, Esperanto ludis multan rolon en tiu ĉi filmo: krom la dialogoj, ankaŭ la murmuroj kaj krioj uzitaj kiel sonefakta bruo en la fono, ktp. Ĉiuj konsentos kun tiu samideano, kiu vidis la filmon kaj diris, "En la filmo estas tiom multe da Esperanto, kiom mi tute ne atendis!"

Koncerne la propagandon per amas-komunikado, la filmo faris bonegan laboron por nia lingvo, ĉar la radio kaj ĵurnaloj jam raportis kun speciala mencio pri la apliko de Esperanto, kaj ankaŭ la kinokompanio mem eldonis grandegan nombron da reklamfolioj kun la nomo Esperanto.



De maldekstre: reĝisoro D. Itow, la helpreĝisoro, la Esperanta gvidanto Huĝimoto, kaj Komandanto *Mirando* dum la loka filmado ĉe Ŝirahama

Japanaj Vizaĝoj (19) *Onĵoo*-bodisatvo*

Antaŭ la Templo de Granda Budao en Nara staras okangula bronza lanterno. Ĉi tiu sola feliĉe restis sendifekta, malgraŭ tio ke la templo perdis siajn originalajn trajtojn pro kelkfoja forbruliĝo de la konstruaĵo. Ĉiu flanko de la lanterno havas belan lozange plektitan panelon el bronzo. Kiam vizitanto staras antaŭ ĝi kaj rigardas ĝin, lia atento altiriĝos al la altreliefo de la fluton ludanta bodisatvo sur unu el tiaj paneloj. Rigardu ke ĝi havas la naivecon de knabo! La vizaĝo esprimas

la emociplonon puran kaj helan, kvazaŭ la flutanto estas ravita de la melodio de sia muzikinstrumento. La forma figurigo estas farita libere kaj impete. Kaj en tio oni vidas la sanan kaj junan spiriton de Nara Epoko.

Hiroŝi Moori, de Kioto
Nacia Muzeo Trad. N. E.

* Onĵoo ĉi tie signifas:
sonanta aŭ flutanta.



Recenzo

★ TAGLIBRO DE ANNE FRANK, el la nederlanda originalo, tradukita de G. J. Degenkamp; eldonita de *Heroldo de Esperanto*, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. Tolbindita kun ora surpriso de la titolo. 219 paĝoj (14.5×24 cm), kun sep ilustraĵoj. Prezo: gld. 7.80 (bfl. 105.-, gmk. 8.75, dol. 2.15) plus 6% por sendkosto.

Ĉi tiu estas taglibro, kiu estas savita anstataŭ ĝia aŭtorineto kaj en kiu ŝi vivas. Ĝin Anne skribadis en la fatala situacio: ŝi estis unu el la okopo devigita sin kaŝadi en la "postdomo" (kaŝloĝejo) kiel la viktimoj de la rasismo. Ili estis judoj. Ili konsistis el ges-roj Frank kaj la du filinoj Margot kaj Anne, la aŭtorino de la taglibro; ges-roj Daan kaj la filo Peter; kaj Dussel, iom poste aliĝinta malparo, kies edzino forestadis eksterlande. La taglibro ampleksas iom pli ol du militajn jarojn: de 12-6-42 ĝis 1-8-44, en Amsterdam sub la germana okupado. Anne aĝis: de 13 ĝis 15 jaroj. Laŭ la pensoj kaj spirito ŝi estas multe pli frumatura ol knabinoj en ŝia aĝo. Tio, kaj ŝia observemo pri interno kaj ekstero, kaj ŝia talento de flua verkado kune faris sian taglibron eksterordinara — taglibro ne de senkoheraj ĉiutagaj okazaĵoj, sed taglibro en formo de kroniko de la milita tempo, kiun ŝi travivis, kaj historieto de la personaj evoluoj spirita kaj korpa, kiujn ŝi trairis en sia vivfazo "sendependiĝa" de la gepatroj aŭ la "ribela" periodo transkreska de bubino al maturulineto.

Entute ĝi estas vivrakonto pri knabino kaj ŝia nenormala medio, verkita de la pura anima knabino mem en la aĝo, de kiu oni ĝenerale tute ne povas atendi ion tiel romanan. Jen pro kio ĝi profunde tuŝas kaj purigas la ĥoron de la legantoj. Tiom pli, ke ĝia fino estas lasita senplue — kvazaŭ "nefinita simfonio" — je la dato 1-8-44, kun la postnoto de la tradukinto, kiu skribas interalie: En marto 1945 mortis Anne en la koncentrejo Bergen-Belsen, du monatojn antaŭ la liberigo de Nederlando.

Anne skribadis la taglibron en leterformo ĉiudate adresita al *Kitty*, nomo de kato, kaj ĉiufoje fermita per *Via Anne*. Unuaj kelkaj tagoj ankoraŭ apartenas al la tempo kiam ŝi iris al la lernejo. Ŝi estis gaja knabino, petola, ŝercema kaj flirtema. Iutage ŝi tro babilis. S-ro Kepler, la maljuna instruisto de matematiko koleris, ripete admonis ŝin kaj fine ordonis al ŝi puntaskon: fari verkaĵon pri la temo "Babilemulino". Hejme vespere:

"Mordante mian fontplumon, mi meditis pri la temo. Skribi ion senkoheran kun vastaj interspacoj povas ĉiu ajn, sed trovi konvinkan argumenton pri la neceso de babilado postulis lertecon. Mi pensis, pensadis, kaj subite mi ekhavis bonan ideon; mi plenskribis la tri ordonitajn paĝojn kaj sentis min kontenta. Kiel argumentojn mi prezentis, ke babilado estas propra al virinoj, ke mi klopodas iom moderigi min, sed certe neniam sukcesos venki tiun kutimon, ĉar mia patrino same multe, se ne pli multe, babilas kiel mi, kaj ke kontraŭ heredaj ecoj estas malfacile batali.

"Sinjoro Kepler ne povis ne ridi pri miaj argumentoj. Sed kiam dum la posta leciono mi denove babilis, sekvis dua puntasko, ĉifoje pri la temo 'Nekorektebla babilulino'. Ankaŭ tiun ĉi taskon mi faris, kaj dum du sinsekvaj lecionoj sinjoro

Kepler ne havis motivon por plendi. En la tria leciono li tamen denove kolereksplodis. 'Anne, kiel puntaskon pri babilado vi faru verkaĵon pri la temo: Kvek, kvek, kvek, diris fraŭlino Babilbek!' La tuta klaso eksplodis en ridon. Vole-nevole ankaŭ mi ridis, kvankam mia elpensemo en la fako verkado pri kvek-kvek-babilado estas elĉerpita. Mi eltrovu ion alian, tute originalan...' Ankaŭ en ĉi tio ŝi sukcesis kaj de tiam ŝi povis babilu, ne riskante ricevi puntaskon.

Sed de kiam ŝia vivo komenciĝis en la postdomo, ŝia babilemo devis esti repuŝata internen. Ŝi sin turnas al sia taglibro korelverse, ĉar "papero estas pli tolerema ol homoj".

"Ju pli longe daŭras nia kunestado en la postdomo, des pli malbonaj fariĝas niaj interrilatoj." La izolita, konstante ŝs-admona (senbrua) loĝado sufoke enfermita, mizeroj de porvivaĵoj, la samdomanaj grumbloj, plendoj, riproĉoj, disputoj, kvereloj; alarmosignaloj, bombardaj tondroj, timoj, maltrankviloj, ĝojoj, esperetoj; ĉion Anne detale priskribas. Ĉio rememorigas al ni la similajn travivaĵojn de la milita tempo; ĉio sama, krom ilia sorto kvazaŭ de la "propekaj kaproj" kaj krom ilia kvazaŭ-krimula timego kaj paliĝo pro ĉiu alpaŝo de la polico.

Anne lerte prezentas la karakterojn de ĉiuj personoj, inkluzive sin mem. Ŝia elaste "babilema" plumo ofte faras el la plenkreskuloj belajn karikaturojn, kiel ŝi vidis ilin per la okuloj de sentema kaj senmakula animo, jen objektive, jen subjektive. Fakte, ŝiaj samdomanoj ĉiuj estas bonanimuloj kaj havas eĉ sufiĉan dozon da bonhumoro por elteni la vivon enŝlositan kvazaŭ en zoologia kaĝaro, kie tamen ne troviĝas la sento de sekureco kaj kontraŭ la aviadila bombardado kaj kontraŭ la homrabaj homoj.

"Kiu surmetis al ni tiun ĉi sorton?

Kiu faris nin, judojn, escepto inter ĉiuj popoloj? Kiu lasis nin ĝis nun tiom suferi? Estas Dio, kiu faris nin tiaj; sed kiu iam relevos nin, ankaŭ tiu estos Dio. Se ni suferos ĉiujn ĉi suferojn, kaj se malgraŭ tio ankoraŭ restos judoj, iam la judoj el kondamnita popolo fariĝos popolo ekzempla. Kiu scias, eble nia religio iam instruos al la mondo kaj al ĉiuj popoloj la bonon; kaj por tio, sole por tio ni ankaŭ devas suferi. Neniam ni povos esti ekskluzive nederlandanoj, angloj aŭ reprezentantoj de kiu ajn lando; krom tio ĉi ni ĉiam restos judoj, sed judoj ni ja volas resti.

"Ni estu kuraĝaj! Ni restu konsciaj pri nia tasko, ne plendante. Elsavo iam venos, Dio neniam forlasis nian popolon. Tra ĉiuj jarcentoj la judoj restis vivantaj, tra ĉiuj jarcentoj judoj estis kondamnataj suferadi, sed tra ĉiuj jarcentoj ili ankaŭ fariĝis fortaj; pereas la malfortuloj, sed la fortuloj postrestos kaj neniam pereos!" (p. 173)

Malgraŭ la aĝo Anne havis la plenan konscion pri sia individueco. Preskaŭ ĉiam ŝi memstare (en la spirito!) frontas kaj elkreskas la provadon de ĉiuj vivturnoj. Por citi kelkajn, ekzemple: post kiam ŝi la unuan fojon am-flustris kun Peter, kiun ŝi antaŭe konsideris "stulta" kaj "teda" knabo (Kitty! — la taglibro — ĉu vi rimarkis, ke en tiu dato 19-3-44, kie ŝi konfesas tion, ŝi finas sian leteron al vi ne per la nevaria *Via Anne*, sed per *Via dankema kaj ĝoja Anne*, kiun finfrazon ŝi uzis neniam antaŭe kaj neniam poste?); post kiam ŝi ricevis en 16-4-44 la unuan vango-kiseton de Peter (ĉu Kitty rimarkis, ke ĉe tiu dat-skribo ŝi indikas eĉ la horon de skribado, kion ŝi neniam faris?); post kiam ŝi kaj la aliaj kaŝloĝantoj havis la plej teruran sperton esti preskaŭ malkaŝitaj de la polico sekve de ŝtelrompo (kion ŝi priskribas en ok! plenaj paĝoj je 11-

4-44), post ĉiu tia vivsperto ŝi ĉiufoje faras grandan metamorfozon de sia interno. De tiu tempo malkreskas en la taglibro pripersonaj kritiketoj; anstataŭe kreskas la esprimado de siaj belaj kaj humanismaj pensoj (kio kompreneble ne mankis ankaŭ en la pli-fruaj tagoj) pri milito, religio, edukado de infanoj (ekz-e, “ĉiu infano devas sin mem eduki: gepatroj povas nur konsili aŭ indiki la vojon, sed la definitiva formado de ies karaktero troviĝas en ĉies propra povo” p.213), ktp., ktp.,

Estas rimarkinde, ke Anne jam de tre frue plenkonsciis ankaŭ pri sia vivcelo kaj esprimis plurloke la deziron, ke ŝia verkaŭo iam estos eldonita. Ekz-e:

“...mia plej arda deziro estas iam fariĝi ĵurnalistino kaj poste fama verkistino. La tempo montros, ĉu iam mi povos realigi tiujn ĉi ambiciojn (aŭ ĉu megalomanion?), sed pri temoj mi ankoraŭ ne sentas mankon. Kiel ajn estos, post la milito mi nepre volas publikigi libron titolitan ‘La Postdomo’. Ĉu mi sukcesos tion fari, mi ankoraŭ ne scias; sed mia taglibro povos esti bazo por ĝi.” (11-5-44).

“Hieraŭ vespere parolis ministro Bolkestein per Radio Oranje; li diris, ke post la milito oni aranĝos kolekton de taglibroj kaj leteroj pri tiu ĉi milito. Kompreneble ĉies okuloj tuj direktis al mia taglibro. Imagu, ke mi eldonos romanon pri ‘La Postdomo’! Ĉu tio ne estas interesa? Laŭ la titolo la homoj certe supozus, ke ĝi estas detektiva romano.

“Sed nun serioze! Verŝajne jam nur dekon da jaroj post la milito preskaŭ nekredible sonos rakonto pri la judoj dum kaŝloĝado: kiel ili vivis, manĝis, parolis.” (29-3-44).

Anne estis tiel klarvida. Ŝia taglibro estas eldonita jam en multaj lingvoj, kaj

eĉ filmigita. Kaj ĝuste “dekon da jaroj post la milito” ĝi aperis ankaŭ en Esperanto. Unu tagon, kiam ŝi akcidente forbruligis sian amatan fontplumon ŝi skribis: “Mia fontplumo estas kremacita*); tion saman mi deziras poste por mi!” Ankoraŭ tiel same realigita estas ŝia deziro: “Mi volas pluvivi ankaŭ post mia morto!” Estas bedaŭrinde, ke la sorto destinis ne alie, ol ke ŝi mortu tiel frue. Sed ŝia surtera vivo estis por elfari ĉi tiun taglibron kiel belan testamenton al la homaro. Anne vivas ankaŭ post sia morto!

La traduko de G. J. Degenkamp, kiel ni vidis el la supraj ekstraktoj, estas tiel bona, ke mi sentis dum legado kvazaŭ Anne estus verkinta en nia lingvo. Nur pri unu vorto mi scivolis: ĉu *rigardi* en “li rigardis ĉagrenite” (p.63) kaj “Dussel rigardis malkontente” (p.77-8) en la nederlanda estus simila al la germana *aus-sehen*? Krome, por mi nekutima estis la uzado de tiaj formoj kiel, “tiel — a, ol se” (p.212 k. a.); “tiel — a, oi” (p.204).

La tradukinto donas plurajn zorgemajn piednotojn, kelkaj el kiuj eĉ estus superfluaĵoj por la okcidentaj legantoj. Sed se Esperanto estas destinita por la kunfandiĝo de la kulturoj okcidenta kaj orienta, tiaj notoj estas gravaj; la ekzemplo de Degenkamp estas sekvinda. Kio estas memkomprenebla, tio ofte prezentas sin nekomprenebla en Oriento, precipe kiam la leganto estas ne tro klera. Ekz-e, mi konfesos mian malscion pri afero, kiun nek Anne nek la tradukinto klarigis. Sur p.106 Anne sopiras al gaja amuziĝo kaj satrido, komparante sin kun aliaj judaj infanoj, kiuj povas viziti hokeoklubojn kaj teatrojn. Ŝajnas, ke unuj judoj bezonis

*o) Kremacio: solena cindrigo de mortinto (Noto de G. J. Degenkamp)

sin kaŝadi (kiel la okopo) kaj la ceteraj povis viziti ilian kaŝloĝejon de ekstere (kiel la “protektantoj” de la okopo, mem estante judoj). Ĉu tia distingo estiĝis ĉefe pro politikaj aŭ profesiaj kaŭzoj?

La libro estas en bela stilo kutima al la eldonaĵoj de *Heroldo de Esperanto*. Ĝi enhavas multajn fotojn: la portretoj de Anne laŭ diversaj jaroj, du aŭtografoj el taglibraj paĝoj, la de-strata vido de la tri-etaĝa magazeno en kiu troviĝis la postdomo, du fotoj de la turnebla “ŝrankpordo” (kaj fermita kaj malfermita) post kiu la okopo kaŝloĝadis, la ĉambra muro ornamita de Anne per fotoj de filmsteloj; tiuj kune kun la skizo de la dominterno donas al la leganto la vivan “detektivromanecan” bildon de la naskejo de la taglibro.

Teruo Mikami



★ FOLIOJ EL LA BILDO-LIBRO DE DIO de Martinus. El la dana originalo tradukis C. Graversen kaj kontrolis la

Literatura Komitato de SAT. Eld. de La Spiritscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danujo. 89 p. (13×19 cm); prezo: 6,50 danaj kronoj.

Ĉi tiu estas la 6-a libro, esp-igita el la originala granda verkaro de Martinus. Laŭ lia jam aperintaj verkoj mi konstatis, ke la aŭtoro estas unu el elstare saĝaj religuloj, kies intelekto estas formita ne per lernado sed per intuicio. Lia rezonado dedukta prefere al indukta estas tamen science logika kaj enhavoriĉa. Unuvorte li estas ne simpla religulo, sed filozofo. En lia karaktero mirinde harmonias racio kaj sentimento. Sed la nova libro “Folioj el la bildolibro de Dio” rimarkigis min ke li cetere havas riĉan fantazion de poeto.

La libro konsistas el du partoj: la unua kun la menciita titolo kaj la dua kun la

titolo: Pentekosta brilo super la vivo.

La unua parto komenciĝas per frazo: “La vivo, la naturo, ni mem kaj ĉio ĉirkaŭ ni povas esti rigardataj kiel granda bildolibro de Dio. En tiu libro Dio rivelacias siajn eternan ekziston kaj ĉiopotencon, siajn senliman saĝon kaj senfinan anon...” Starante sur tiu ĉi grandioza bildo la kutima tezo de Martinus pri la eterneco de la homa spirito disvolviĝas ĉi-foje kun simbolriĉaj bildoj troveblaj en la naturo — specialaj fenomenoj de la someraj mateno, tago kaj nokto. Tiamaniere la tuto de la unua parto estas trateksita per liaj pĉeziaj fantazioj kaj kosmologie logikaj konkludoj, kiuj ĉi tie mirinde harmonias unuj kun aliaj, kvankam ili ŝajnas funkcii antipode.

En la dua parto: Pentekosta brilo super la vivo, la pozio jam sin cedas al lia kutima logikemo. Laŭ lia aserto la celo de la mondsavado estas evoluigi ĉiun teran homon al senpera koncepto de tiu pura suvereneco de la spirito. Tion ĉi mi persone konsentas tutece, kaj sendube kredas ke tiu vero, per kiu Martinus strebas prepari la grundon por kunligi la materialismon kaj la spiritualismon, kiel anima nutraĵo, estos alprenata pli kaj pli vaste de la ĝenerala popolo kun la progreso de la nova epoko. Verserĉantoj ŝatos legi la libron kaj ĝuos la legadon de la noblpensa enhavo dank’ al la eleganta traduko en esperanto. La 6-a libro de la Martinus-serio estas aperinta post dujara silento. La plua eldono estu aktive plenumata!

N. Esami

★ La BELAN PACON, de Senzi Yamaguti, atombombita postvivanto, trad. de Ter. Isiguro. Eldonis JAŬDA RONDO, Sugamo 7 — 1662, Tosima-ku, TOKIO, 1959. Havebla ĉe Japana Esperanto-Instituto, Motomati 1-13, Bunkyo-ku, Tokio, Japanujo. Prezo: ¥60 aŭ egalvaloro.

31 paĝoj. Formato: 13×18.3 cm.

Tiu ĉi estas bela libreto, verkita de unu el la atombombaj viktimoj en Nagasaki. Ĝis nun aperis pluraj verkoj kaj dokumentoj en Esp. pri la kruelaĵoj de la atombombo, sed ili ĉefe temis pri Hiroŝima. Nun ni povas scii, kio okazis en Nagasaki, kie 73,000 homoj perdis unu-momente la vivon kaj 75,000 vundiĝis.

La aŭtoro, s-ro Senzi Yamaguti, tiam dekkvarjara knabo, plu vivis 14 jarojn post la frapiĝo je la radioaktivo kaj verkis siajn "travivaĵojn", forte dezirante ke la diabla kruelaĵo neniam ripetigŭ. Li verkis ĝin sincere. En la antaŭa duono de la verko ni legas i. a., ke li plene malbenis sian vivon pro la keloido-cikatro, kiun li ricevis sur sia tuta vizaĝo kaj pro la mensa afliktiĝo, kiun kaŭzis al li ĉiuspecaj simptomoj de radioaktiva malsano. Tamen, spertinte tian mizeran postvivadon kune kun aliaj samsortanoj, li iom post iom venas al la konvinko, ke ili devas ne ĉagreniĝi pro sia sorto, sed devas fari plejblon por nenigi saman sperton al aliaj en la estonto. En la lasta duono, tial, troviĝas ilia sincera espero kaj agado organizi la samsortanojn en unu rondo por konsoli mem unu la alian kaj samtempe antaŭenpuŝi la movadon kontraŭ A- kaj H-bomboj spite de siaj fizikaj malavantaĝoj. La libreton trafluas la penso de la aro da malfeliĉaj viktimoj, kiuj tamen ne lamentas pri si, sed male, esperplene vivas ĉiutage spite al doloraj malfacilaĵoj.

La traduko estas bone farita. Ni gratulas Jaŭdan Rondon, kiu per la eldono de tiu ĉi libreto, aktive kunlaboras por nia komuna celo: la mondpaco.

Sur la koverto troviĝas la bildo de la sankta virgulino kaj la ruinoj de la Uragami-katedralo, detruita de la atombombo.

Mi rekomendas tiun ĉi libreton al ĉiuj esperantistoj, kiuj deziras "Belan pacon por Ĉiu".

J. Umeda

STAFETO

Eld. J. Régulo Pérez

Omaĝe al la kreinto de Esperanto, en la Zamenhofa Jaro, STAFETO kontribuis jenajn kvar solidajn verkojn:

Julio Baghy

SONĜE SUB POMARBO

triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj; 232 paĝoj, 5 ekstertekstaj bildoj — Prezo: 1,80 us. dol.

ESPERANTA ANTOLOGIO

Poemoj 1887–1957

redaktita de *William Auld*

648 paĝoj, 10 bildoj, pli ol 360 poemoj de 90 poetoj el 35 landoj de ĉiuj kontinentoj. — Broŝ. 3,60; bind. 4,20 us dol.

Gaston Waringhien

LINGVO KAJ VIVO

Esperantologiaj Eseoj

Elĉerpa analizo de la lingvo de Zamenhof ĉ. 460-paĝa volumo

Marjorie Boulton

EROJ

(Originala poemaro)

ĉ. 350-paĝa volumo

Kvar aliaj volumoj de STAFETO aperos probable en la fino de 1959! La librojn liveras la eldonisto, *J. Régulo*, UEA, kaj ĉiuj libro-servoj de la Movado.